# Esperanto-Brno

*Esperanto-Brno - Informoj pri Brno - Legendoj*

## Maldeca vireto ĉe la preĝejo de sankta Jakobo

*Miroslav Hruška*

Kiam oni rekonstruis malnovan kirkon sur la monteto Petrov, ties urbanaro havis por konstruado sufiĉe da mono. En la sama tempo oni komencis konstrui kirkon de Jakobo malsupre en la urbo. Sed tie ili ne havis sufiĉe da mono, ili devis bone kalkuli kaj ŝpari. Sed ili havis feliĉon, ke ili havis elstaran metiiston. Li antaŭe konstruis kirkon en Strasburgo. La majstro bone komprenis sian profesion kaj la laboro estis rapida kaj efika. Li estis ankaŭ kamarada kaj bonhumora. Kaj homoj ŝatis lin, kiam li parolis pri fremdaj landoj.

La konstruado sur Petrov ankaŭ progresis - sed nur malrapide. Kaj la metiisto mokis: „Mi foriros el Brunno pli frue ol mi vidos la kirkon de Petrov." La urbanoj eksciis pri la konversacio kaj ili atingis tion, ke la kara metiisto devis foriri el la urbo. Kiam oni diris tion kun peza koro ĉe la konstruado de Jakobo, li ĵetis frakasan rigardon al ili kaj nur diris: „Kion fari, raraj sinjoroj? Sed jes, mi iros. Sed mi havas almenaŭ unu deziron. Lasu min finfari la fenestron, kiun mi nun faris."

Ili permesis tion kaj atendis, ĝis li finfaros sian lastan laboron sur la kirko.

Granda surprizo atendis ilin! Kiam la majstro finfaris la fenestron kaj li malkovris ĝin, ĉiuj vidis, ke en la loko, kie la du arkoj kuniĝas, estas skulptita malgranda vireto, kaj lia nuda postaĵo indikas al Petrov!

Tiel la majstro venĝis sin kontraŭ la urbanoj de Petrov pro tio, ke ili elpuŝis lin el la urbo.

*Tio estas fino, dankon.*

*Por mia hodiaŭa prelego mi elektis denove brunnajn legendojn. Do, estas necese diri al vi, kr Brunno havas multe da legendoj. Kaj la legendoj estas diversaj, foje longaj, foje malpli longaj. Do, hodiaŭ mi elektis mallongan legendon. Sed la legendo estas tre interesa.*